# N O V J A R A   A M U Z A D O

## ①   K R E U   N O V A J N   V O R T O J N

*aldonante* (a) *unu literon en la internon aŭ*
*forprenante* (f) *unu literon el la interno aŭ*
*ŝanĝante* (ŝ) *unu literon en la interno de la donita vorto.*
(Ekzemploj: *koro* (a) > *kor**b**o, sa**ŭ**no* (f) > *sano*, no**m**o (ŝ) > no**t**o)

Skribu la aldonitajn, forprenitajn aŭ ŝanĝitajn literojn laŭvice en la subajn kvadratetojn. Ĉe „ŝ“-vortoj estas aldonitaj helpiloj.

1 a**p**ero (ŝ)
2 p**o**to (ŝ) deziro
3 povo (a)
4 p**e**nto (ŝ) supro
5 ka**t**o (ŝ) manĝaĵo
6 pro (a)
7 klinko (f)
8 obsti**p**o (ŝ) eco
9 b**a**no (ŝ)
10 kvino (f)
11 pino (a)
12 koto (a)
13 fojno (f)
14 paro (f)
15 poto (a)
16 spiono (f)
17 koko (a)

| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | |

| 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
|---|---|---|---|---|
| | | | | |

| 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | ! |
|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | |

## ②   A M U Z A   M A T E M E T I K O

PER KIUJ NUMEROJ VI ANSTATAŬOS LA DEMANDSIGNOJN?



| | | |
|---|---|---|
| | | 7 |
| 6 | 1 | |
| | | 6 |

## ③ MEZE DE ROMANTIKA VOJO

Konatiĝu kun germana urbo Augsburg, kie okazis en la jaro 1985 UK de Esperanto

Kvaron-miliona kongres-urbo de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto festas du-mil-jaran dat-re-venon de sia estiĝo.

Ĝi estas Augsburg, unu el la plej malnovaj germanaj urboj kaj laŭ-grande la tria en la federacia lando Bavario. Sam-tempe ĝi estas ĉef-urbo de la bavara provinco Svabio.

Augsburgon oni fondis en la nomo de la romia imperiestro Augustus. Sia-tempe ĝi nomiĝis latine Augusta Vindelicorum. Sed ĝia dis-floro okazis precipe en la mez-epoko, dank´ al gravaj kaj riĉaj komercistaj familioj Fugger kaj Walser, kiuj havis tut-mondajn kontaktojn. En tiu tempo Augsburg fariĝis grava centro de ekonomia kaj kultura vivo en Eŭropo.

El-stara konstruisto Elias Holl per siaj renesancaj konstruaĵoj donis al la urbo apartan vizaĝon. La plej interesa estas la urbo-domo el la komenco de la 17a jar-cento.

Multaj aliaj gloraj personecoj vivis kaj laboris en Augsburg. Ekzemple Leopold Mozart, la patro de la genia Wolfgang Amadeus Mozart, aŭ Rudolf Diesel, kiu el-trovis tie dizel-motoron. La filo de la urbo estas ankaŭ Bertold Brecht. Martin Luther defendis en Augsburg siajn reformaciajn tezojn. Unu el la plej el-staraj artistoj, kiuj laboris en tiu ĉi mal-nova urbo, estas Hans Holbein la pli aĝa. Liaj bildoj troviĝas en la loka katedralo.

Augsburg kiel unu-sola urbo en la mondo ĉiu-jare la 8an de aŭgusto per festo re-memoras la inter-paciĝon inter la katolikoj kaj protestantoj post la tridek-jara milito en la jaro 1650.

Jam ek de sia estiĝo Augsburg estas grava punkto de trafikaj linioj de la tuta Eŭropo. Ĝi troviĝas meze de la Romantika vojo, kiu kondukas de Wurzburg al Fussen.

Per unu-hora aŭto-veturo estas atingeblaj Bavaraj Alpoj kaj sufiĉe proksime estas ankaŭ interesaj urboj kiel Nurnberg, Ulm, Bamberg, Coburg kaj la ĉef-urbo de Bavario - Mŭnehen.

JA januaro 1985, n-ro1, paĝo 8-9

Noto: Por faciligi al komencantoj komprenon de kunmetitaj vortoj kaj vortoj kun prefiksoj kaj sufiksoj estas tiaj vortoj en la artikolo disdividitaj per streketoj -.

## ④ Komparu la nomojn de monatoj en kelkaj eŭropaj lingvoj:

| Pola | Slovena | Kroata | Ukrajna | Suoma | Litova | Turka |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1. Styczen | Prosinec | Sijecanj | Siceny | Tammikuu | Sausis | Ocak |
| 2. Luty | Svecan | Veljaca | Lutij | Helmikuu | Vasaris | Subat |
| 3. Marzec | Susec | Ozujak | Bezezeny | Maaliskuu | Kovas | Mart |
| 4. Kwiecien | Maly Traven | Travanj | Kviteny | Huhtikuu | Balandis | Nisan |
| 5. Maj | Veliki Traven | Svibanj | Traveny | Toukokuu | Geguze | Mayis |
| 6. Czerwiec | Roznik (Kresnik) | Lipanj | Cerveny | Kesakuu | Birzelis | Haziran |
| 7. Lipiec | Mali srpan | Srpanj | Lipeny | Heinakuu | Liepa | Temmuz |

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 8. Sierpien | Veliki srpan | Kolovoz | Serpeny | Elokuu | Rugpjutis | Agustos |
| 9. Wrzesien | Kimovec | Rujan | Verewny | Syyskuu | Rugsejis | Eylul |
| 10. Pazdziernik | Vinotok | Listopad | Zovteny | Lokakuu | Spalis | Ekim |
| 11. Listopad | Listopad | Studeni | Listopad | Marraskuu | Lapkritis | Kasim |
| 12. Grudzien | Gruden | Prosmac | Hrudeny | Joulukuu | Gruodis | Aralik |

JA januaro 1985, n-ro1, paĝo 20

# ⑤ SOLVU LA KRUCENIGMON!

| | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | 2 | 3 | 4 | | 5 | Ĵ | 6 | | 7 | 8 | | I |
| | ■ | 9 | | ■ | 10 | 11 | | ■ | 12 | | ■ | |
| 13 | 14 | ■ | 15 | 16 | | | | 17 | | ■ | 18 | |
| 19 | | 20 | ■ | 21 | | | | | ■ | 22 | | |
| 23 | | | 24 | ■ | 25 | | | ■ | 26 | | | |
| 27 | | | | | ■ | | ■ | 28 | | | | |
| | ■ | 29 | | ■ | 30 | | | ■ | 31 | | ■ | |
| 32 | 33 | | | | ■ | | ■ | 34 | | | 35 | |
| 36 | | | | ■ | 37 | | 38 | ■ | 39 | | | |
| 40 | | | ■ | 41 | | | | 42 | ■ | 43 | | |
| 44 | | ■ | 45 | | | | | | 46 | ■ | 47 | |
| | ■ | 48 | | ■ | 49 | | | ■ | 50 | 51 | ■ | |
| T | | | | | | V | | | | | | ☺ |

- Kio estas svetero, Petro? - demandas la instrusistino. (Daŭrigon vidu en la linioj H.2., V.11. kaj V.1.)

*Horizontale*: 9. Artikolo, 10. Sufikso, 12. Mezo de „peko", 13. Malliberejo de grafo M. Christo, 15. Materion de la pano 18. Angle „de", 19. Enspiraĵ, 21. Igos, 22. Malgranda, 23. Scenejo de la cirko, (R), 25. Samaj literoj, 26. Esp. renkontiĝo en Abaliget, 27. Eligis manĝaĵon el stomako, 28. Bando, 29. Duon-erpo, 30. T-oj, 31. Mezo de lipo, 32. Diris ies nomon, 34. Reen: Konvenus, 36. Alvenigo (reen) 37. Sekvas la sepan, 39. Reen: Moral', 40. Prepozicio, 41. Konduki aŭtomobilon, 43. Patro de patro - mikse, 44. E.P., 45. Reen: Rampulon, 47. Reen: mezo de korpo-parto, 48. Komenco de lato, 49. Australia kurbirdeg, (reen), 50. Mult'

*Vertikale*: 3. Prepozicio, 4. Pelta besto (R)--sen supersigno, 5. Virina nomo (reen), 6. Altaĵo (reen), 7. Laŭ iu direkto, 8. Universala Kongreso, 14. Metalo, 16. A.F. 17. O.S., 18. Ĝentila postulo (reen), 20.

Elvoko en memor' (R), 22. Vulkana elsputo, 24. Reen: Parulo de vir', 26. Reen: Fari varman manĝon, 33. Reen: Preno (sen R), 35. Kemia gas', 37. Reen: Sporta disciplino, 38. Milita, 41. Unua duono de sola, 42. Romia du, 45. Reen: Korpopart, 46. Perua best' (R), 48. Konsonantoj de laso, 51. Greka kaj Esp-a litero

Atentigo: V.20 fine: O=E, R=N

J. Fdrizs

JA januaro 1985, n-ro 1, paĝo 18

⑥

# E N I G M O

Nur kvin el la literitaj figuroj estas egalaj al la numeritaj.

Kiuj estas tiuj?




JUNA AMIKO decembro 1999 n-ro 4 paĝo 27

⑦

# H U M U R O



- Mi havas tre inteligentan hundon. Ĝi - portadas al mi ĉiutage gazeton. - Tion scipovas ĉiu meze lerta hundo. - Eble, sed mi nenian gazeton antaŭpagis.

• • •

Kia devas esti la elstara ĉefkuiristo? oni demandas en la hotellernejo. – La ĉef-kuiristo devas esti homo, kiu scipovas el-pensi dudek nomojn por la bovaĵo kun terpomoj.

• • •

Fiŝo, kiun mi hieraŭ aĉetis ĉe vi, ne estis freŝfa - plendas la virino en vendejo. - Ne eble - miras la vendistino. Ĝi venis rekte de la maro. - Tiam ĝi venis de tie perpiede.

• • •

JA januaro 1995 n-ro 1, paĝo 24